


3^a trimestro 2015

En tiu numero
vi legos..



TERURAJ TERTREMOJ EN CHRISTCHURCH

de Erin McGifford
(fino)

Erin, la amikino de Jeannine kaj Gérard, daŭrigas la rakonton pri la teruraj tertremoj, kiuj detruis sian domon	p.1 p.2 p.3
Jeannine kaj Gérard Layseman tradukis artikolon de la ĵurnalo "Nouvelle République" pri Olympe de Gouges	p.5
André Aude havis ofte la plezuron ĉiĉeroni eksterlandajn amikojn tra la stratoj de Tours, ni sekvas lin...	p.4 p.5 p.6
Alia ĉiĉerono, Denis Jeanteur vizitigas al ni la bierfarejon Le-pers.	p. 6 kaj p. 7
Mi (Jacques) havas strangan ĉinan akcenton !	p.8
Post la legado, vi ĉiuj meritas deserton. Jen la recepto proponata de Jeannine	p. 8

(kursive : fino de la unua parto)

Fakte, estas utile ke la falantaj brikoj rompis du fenestrojn, ĉar per ili mi povis eniri mian domon spite la ŝtopitajn pordojn.

Kiam mi haltas momente kaj pensas pri la situacio mi sentas etan tremon en mi mem - la ŝoko mi supozas. Sed precipe mi sentas adrenalinon - estas tiom por fari, kaj mi forte deziras fari ĝin. Kaj mi estas feliĉa ke mi travivis tiom grandan tertremon sen pli grandaj problemoj.

Mi pripensas mian tegmenton. La amaso de brikoj kaj pecoj de betono sur la tegmento estas tre peza. Mi timas ke ĝi difektigos la tegmenton, aŭ falos tra la tegmenta fenestro. Eble ĝi jam difektigis la tegmenton.

Mi uzas ŝtuparon por grimpi sur la tegmenton. Jes, povus esti danĝere por mi se alia tertremo okazas dum mi estas sur la tegmento. Tamen, mi devas forigi tiujn brikojn !

Mi ĵetas la brikojn sur la gazonon. Kelkaj estas ligitaj al aliaj

brikoj - mi batas ilin por disigi ilin. Mi ankaŭ devas bati la grandajn pecojn de betono por rompi ilin en pli malgrandajn pecojn. Estas multa mortera polvo sur la tegmento - jen tio kion mi flaris dum la tertremo. Finfine ĉio estas sur la tero. Mi trovas ke la tegmento iomete kurbiĝis kaj enfalis pro la pezo de la brikoj. La farbo estas gratita, kaj estas kelkaj etaj truoj.

Sed mi multe trankviliĝas pro la forigo de la brikoj de sur la tegmento.

Kaj kiam plua granda tertremo de 5.9 okazas je 2.50 ptm mi jam grimpis malalten ĝis la tero ...

Multaj tertremoj okazas hodiaŭ - de post la ĉefa tertremo en la mezo de la tago, ĝis la fino de la nokto ni travivas 44 tertremojn de grandeco 4 - 4,9, kaj kvar de inter 5 - 5,9.

Mi nun kontrolas la aliajn difektojn rilate al mia domo kaj terpeco.


Sablo kaj akvo spruĉis el la grundo en diversaj lokoj - el la gazono, el la piedvojoj, kaj sub la domo.

Miaj betonaj piedvojoj estis rompigitaj per 9 aŭ 10 fendetoj larĝa je kelkaj cm.

La strato nun estas je 13 centimetroj pli

alta ol mia terpeco.


Sablo-vulkanoj en mia gazono



Fendetoj inter la vojo kaj mia terpeco

kuirejo kaj la sidĉambro.

Multaj metalaj bretaroj nun tordiĝas aŭ falas.



Metalaj bretaroj tordiĝis

Partoj de mia terpeco nun klinetiĝas en diversaj direktoj. Kiam oni staras tie oni sentas iomete malekvilibra. Plej grave estas ke unu angulo de la domo nun malaltiĝis iomete (eble nur 5-10 centimetroj) kaj tio streĉas la tutan domon. Ĝi kaŭzas fendetojn en la muroj kaj plafono; kaj kelkaj pordoj nun ne bone funkcias.

Mi ne havas elektran povon aŭ akvon, kaj la necesejo ne funkcias. Feliĉe la puto ankoraŭ funkcias - sed mi ne scias ĉu la akvo estas pura.

Mia dratkonekta telefono ankoraŭ funkcias,

sed ne la aldonaj aparatoj aŭ mia respondo-maŝino.

Kiam krepuskas mi lumigas kandelojn, unu en la kuirejo kaj unu en la sidĉambro. Estas pli hejmece kaj komforte kiam oni povas vidi lumon en alia ĉambro, ne nur unusolan lumopunkton en tute malluma domo.

Mi timetas ke plia tertremo povus ĵeti la kandelojn suben kaj kaŭzi fajron; tial, mi metas la kuirejan kandelon sur la forno, kaj metas la sidĉambran kandelon sur la tablo kaj sidas apud ĝi.

Mi manĝas malvarman manĝaĵon el du ladskatoloj: fiŝo kaj tomatoj; kaj mi trinkas zingibran bieron. Kvankam mi energie laboris dum kelkaj horoj mi ne multe malsatas - mi supozas ke adrenalino subtenas min.

Mi ne havas televidilon, komputilon aŭ intereton, sed mi havas etan porteban radion (mia elektra kompanio disdonis ĝin post la septembra tertremo). Mi ne volas elĉerpi la baterion, do mi ŝaltas ĝin nur de tempo al tempo.

Mi enlitiĝas pli frue ol kutime, kaj dormas bone.


Post la tertremo la Instanco pri Naturaj Krizoj instrukiis nin fosi necesejon en niaj ĝardenoj, ĉar la kloaka sistemo rompiĝis.

La mezo de Christchurch estis grave difektita pro la tertremo. Oni nomis ĝin la Ruĝan Zonon kaj konstruis barilon ĉirkaŭ ĝi. Soldatoj kaj policianoj gardis ĝin. Mia domo estis en tiu ruĝa zono.

Mia loka butikaro havis naŭ butikojn antaŭ la tertremo, kaj sep ruiniĝis. Mi povis eliri por viziti aliajn butikojn ktp, sed kiam mi deziris reeniri mi devis montri dokumentojn kiuj pruvis mian nomon kaj adreson. Mi devis reveni hejmen antaŭ la sesa vespere.

Kvar tagojn post la tertremo oni inspektis mian domon. Oni vidis la grandan amason da brikoj kiuj premis kontraŭ unu muro - eble ok tunoj - kaj decidis ke ĝi danĝere minacas mian domon.

Oni donis al mia domo ruĝan afiŝon. Tio signifas ke mi ne plu rajtas loĝi en mia domo - aŭ eĉ eniri ĝin. Tio estis granda ŝoko al mi.



Ruĝa afiŝo:
"Danĝero: ne eniru aŭ enloĝu"

Amikinoj gastigis min dum kelkaj tagoj. Mi revenis al mia domo ĉiutage kaj movis brikojn. Mi timis eniri tiun mallarĝan spacon inter la du domoj, sed mi devis forigi tiujn brikojn!

Mi multe laboris kaj forigis centojn da brikoj. Post kelkaj tagoj alia inspektoro rigardis la restaĵon kaj forprenis mian aĉan ruĝan afiŝon. Mi rajtis denove loĝi en mia hejmo!

Mi estis treege feliĉa, kvankam mi ankoraŭ ne havis elektran povon, aŭ akvon, aŭ necesejon.

Iom post iom oni restarigis aferojn: elektran povon post 11 tagoj, malgrandigon de la ruĝa zono, liveradon de poŝtaĵoj, starigon de surstrata necesejo (13 tagoj), rekonekton de mia komputilo kaj interreto (21 tagoj), kaj riparon de mia akvo-tubo (30 tagoj). Boligo de akvo ĉesis post 46 tagoj.

Mi daŭre devis uzi la publikan surstratan necesejon, ĉar la tuboj inter mia necesejo kaj la kloako sub la strato difektiĝis; kaj mi havis

nur malvarman akvon.

Post-skribo


Post la tertremo oni dividis la tutan urbon en zonojn laŭ la stabileco de la grundo.

Se bona, oni estas en la verda zono. Se malbona oni estas en la ruĝa zono.

Mia distrikto estis en la oranĝa zono. La grundo suferis multajn difektojn sed la inĝenieroj volas plue esplori la situacion. Se oni metos mian domon en la verdan zonon mi povos ripari ĝin kaj daŭre loĝi en ĝi. Se ruĝa, la registaro aĉetos mian domon laŭ valoro de 2007 kaj detruos ĝin, kaj mi devos aĉeti alian domon en alia parto de la urbo.

En marto 2012 oni nomis mian domon "ruga". Mi aĉetis domon en alia kvartalo, kaj poste oni detruis mian "ruga" domon. Mi estas kontenta pri mia nova domo, sed malĝoja ke mi devis forlasi belan kvartalon proksime al la rivero kaj al la urbcentro.

Mi ankaŭ lamentas ke mia eta domo kiu fidele ŝirmis min dum 34 jaroj devis esti tiel forigita.



Mia strato post la forigo de domoj (la apartamentaron je la maldekstra flanko oni detruis post mi faris ĉi tiun foton)

Represita (kun kelkaj ŝanĝoj) el la gazeto:

Esperanto sub la Suda Kruco; oficiala organo de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj.

La artikolo unue estis prelego al la Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso de Januaro 2012.

Olympe de Gouges, reaperanta feministo.



Longtempe en mallumo, tiu humanistino gilotita en 1793 staras en la fokuso de pluraj kulturaj projektoj kaj de unu ceremonio ĉe Nacia Asembleo.

Oni malpermesis al ŝi, estante virino, eniri Nacian Asembleon.

Tamen estas en tiu alta loko de la Respubliko, ke la feministo, grava persono de la Revolucio estis laŭdita la 7an de Majo 2015, 222 jarojn post sia morto. Letero skribita de ŝi en 1789, estos interalie prezentata antaŭ la instalado Oktobre de ŝia busto en la salono de la Kvar Kolonoj.

Rigardata kiel la unua franca feministo, Olympe de Gouges, « komprenis tre frue, ke la virinoj gajnas nenion far la Revolucio », klarigas la historisto Olivier Blanc, specialisto de tiu eminentulino. « Ŝi skribis al pluraj Prezidentoj de la Asembleo, por ke ili metu en la tagordo, novajn rajtojn por la virinoj », vane.

Domo en Turanĝio

Tiam, en 1792, ŝi redaktis la Deklaracion de la virino kaj de la civitanino, tekston tre avangardan. Ŝia ĉefa depostulo : la voĉdona rajto. « La virino rajtas supreniri la eŝafodon, ŝi devas simile havi rajton supreniri la tribunan » proklamas ŝi en famkonata formulo.

Profunde humanista, Olympe de Gouges publikis multegojn da panfletoj kaj de teatraĵoj por postuli la rajton al la referendumo, al la abolicio de la mortpuno kaj de la sklaveco. Ŝiaj opinioj ĝenis : « Ŝia teatraĵo pri la divorco okazigis grandan socian debaton, iomete kiel la geedziĝon por ĉiuj en 2013 », opinias Olivier Blanc.

Ekzaltita, Olympe iras ĝisfino de siaj ideoj, ĝis nesingardo. Agresita en Marto 1793, dum la Teruro, ŝi decidis translokiĝi en Turanĝion, kie ŝia filo garnizonis. Sed, ŝi restis nur unu

monaton kaj duonon en sia domo de Saint-Etienne-de-Chigny, (urbeto inter Tours kaj Langeais).

Sciante, ke ŝiaj ĝirondistaj deputitaj amikoj estis eksigitaj, ŝi haste revenis al Parizo por defendi ilin. Arestita siavice en Julio, Olympe de Gouges estis gilotinita la 3an de Novembro 1793. Ĉe la eŝafodo, ŝi ekkriis : « Infanoj de la patrio, vi venĝu mian morton ! »

Ŝi ĝuste antaŭvidis. Longtempe forgesita, Olympe de Gouges estas nun objekto de kultura renesanco. Ŝi estas heroino de pluraj bildstrioj, el kiuj, tiu de Catel kaj Bocquet, kiu ĵus estas publikata ĉe Casterman, heroino de filmprojekto kaj de teatraĵo. Ŝi eĉ preskaŭ sukcesis sian eniron en la « Panthéon* », tiun jaron.

Por Olivier Blanc, « ŝia verkaro ebligas relanĉi la debaton pri la loko, la rolo de la virinoj en la tuta mondo. » En Francio, « ŝi rolas en la renoviĝo de la feminismo. Multaj intelektulinoj, de nun, pretendas pro Olympes de Gouges. » Justa reveno por virino kun antaŭtempaj ideoj.

Chloé Bossard.

Traduko far Jeannine kaj Gérard Layseman, de artikolo de la tagĵurnalo « la Nouvelle République » de la 7a de Majo 2015.

Bildo el Vikipedio, kie la artikolon « Olympe de Gouge » vi povos legi en la esperanta.


*Panthéon : pariza monumento, kies rolo estas honori la famajn francajn personojn.

Promenado en Tours

Kiam mi havas tro da artikoloj por plenigi la ok paĝojn de nia gazeto mi ilin metas en dosierujon. De longa tempo, mi ne bezonis malfermi ĝin... sed hodiaŭ kvankam mi malfruas por finprepari tiun numeron (de la antaŭa trimestro) necesas trovi artikolojn por plenigi kolumnojn.

Jen promenado en Tours, sub la gvidado de la karmemora André Aude.

La apudan foton mi fotis okaze de la zamenhofa festo 2012.



Bonvolu sekvi nian ĉiĉeronon...

"Muzeo : en la ĝardeno, antaŭe monumento al tri famaj kuracistoj naskitaj en Toursa regiono : Bretonneau, Velpeau, Trousseau (tiu lasta naskita en Tours mem).

La Muzeo estas eksa arkiepiskopejo. Maldekstra turo indikas angulon de la Romana murego.

Dum 1870 - 1871 ĝi estis provizora sidejo de la registaro.

Dum 1905, pro la konflikto inter la Ŝtato kaj la eklezio, la Ŝtato prenis la palacon kaj la urbo instalas en ĝi la muzeon de belartaĵoj (malfermita la 1an de Novembro 1910)

En la keloj troviĝas restaĵoj kaj fundamento de la galo-romana murego - estas skribaĵo, kiu memorigas ke dum la romana okupado Tours estis libera urbo. La korto oriente estas la sud-okcidenta parto de la murego de la romana amfiteatro kiu poste fariĝis fortikaĵa muro.

Katedralo : la konstruado daŭris 3 jarcentojn 1/2 (1170 - 1547). Ĝi estis fondita de Saint Lidoire, dediĉita de Saint Martin al Saint Maurice - ĝis la 14a jarcento ĝi nomiĝis St Maurice, poste nomiĝis St Gatien pro la fratularo kiu multe agadis pri ĝia finigado. La turoj estas 70 m altaj, La longeco estas 100 m, la larĝeco 46 m. Interne la alteco de la volboj estas 29m. Interne troviĝas tombo de la infanoj de Karlo la 8a, el blanka marmoro, farita dum 1506 en la baziliko St Martin kaj translokigita dum 1815 ĉi tie. Oni supozas, ke estas ĉefverko de Michel Colombe, helpata de italaj artistoj.

Apude la **Klostro de la Psalette** de la 15a kaj 16a jarcentoj.

Placo Foire-le-Roi : tiel nomata ĉar tie Francisko la unua fondis liberan foiron dum 1545.

Tie oni festis la teatraĵon "misteroj", note por festi la eniron en Tours de la reĝoj Karlo 7a, Karlo 8a kaj Ludoviko 12a.

Eksarkeologia muzeo estis loĝejo de Philibert Babou de la Bourdaisière, supera estro de la financoj de Francisko la 1a.

Tour de Guise : Tie troviĝis la kastelo de

Tours. 5 tagoj post sia venko en Orléans, Jeanne d'Arc estie tie akceptita de la reĝo. La turo havas nomon Tour de Guise ĉar en ĝi estis enkarcerigita la dukido de Guise, princo de Joinville post la murdo de lia patro en Blois. Li de tie forkuris la 15an de Aŭgusto 1591

Ponto : ĝi estis la unua de tiu speco de Francujo, konstruita dum 1765, longeco 424 m.

Strato Nationale : en ĝi troviĝis domon n° 39, kie la 20an de Majo 1799 naskiĝis Honoré de Balzac.

Preĝejo Saint Julien kaj abatejo. Estas legendo, kiu diras, ke Clovis venkinta la Vizigojn al Vouillé dum 1507, venante en la baziliko St Martin por danki, haltis sur tiu placo kaj fondis monaĥejon de St Julien. Detruita de la Normandoj dum 853, rekonstruita dum la 10a jarcento. De tiam datumas la romana turo.

Dum 1224 uragano detruis detruis la preĝejon, de tiam datumas la restaĵoj.

Post la detruoj de la lasta milito oni malkovris interesajn restaĵojn.

Placo Plumereau : Domoj de la 15a jarcento. Ĉe la n°7, restaĵoj de la preĝejo St Pierre-le-Puellier, de la 12a jarcento.

Strato du Change : nomata tiel ĉar troviĝis monŝanĝejo, kie la pilgrimantoj ŝanĝis sian monon kontraŭ "livre tournois".

Strato de la Rotisserie : la domo n°4 datumas de la krucaj militoj, ĉi tie meditis Jacques de Meslay, granda estro de Templiers. Ankaŭ tie restadis karlo 7a kaj Ludoviko 11a.

Placo du Grand Marché : tie, dum mezepoko troviĝis la eŝafodo, kie okazis la ekzekutoj.

Saint Martin : Konstuaĵo decidita en 469 de St Perpet honore al St Martin. Dum mezepoko, papoj kaj reĝoj venis tie. De la restantaj turoj ĝis la loko de la nuna baziliko staris unu sola konstruaĵo, kiu ruiniĝis dum 1797, nur restis la du turoj. Dum 1887 estis konstruita la nuna baziliko en kiu troviĝas la tombo de St Martin.

Tour de l'horloge : konstruita dum la 12a jarcento.

Tour Charlemagne : ĉe la turo estis entombigita Liutgarde, edzino de Charlemagne, mortinta dum 800. Parto de la fasado falis la 26an de Marto 1928, tuj post la paso de tramo.

Urbodomo : La figuroj sub la balkono estis skulptitaj de Sicard. Ĉirkaŭ la horloĝo kuŝas la Loire kaj le Cher de Injalbert.

Juĝejo : inaŭgurita dum 1845.

Poŝtoficejo : tie troviĝis la malliberejo.

André Aude

Bierfarado

Inter la diversaj ekskursoj, proponitaj okaze de la 100a Universala Kongreso, ni povis elekti viziton de la bierfarejo Lepers. Nia ĉiĉerono estis Denis Jeanteur, kiu kuraĝe konsentis organizi la viziton. Li klarigis sciencce la etapojn de la bierfarado.

Enkonduko

Bierfarado estas kompleksa procedo kun du ĉefaj etapoj, kiuj korespondas al du biokeemiaj transformadoj. Ofte nur la dua parto, okazinta en la bierfarejo, nomiĝas **bierfarado** kaj plejofte la unua parto, la **maltigado**, estas zorgita en aparta fabriko, la maltejo.

En la maltejo, la grajnoj de greno estas pu-

rigitaj kaj ĝermigitaj en varma akvo (1, 2).


Poste ili estas sekigitaj kaj rostitaj (3). Tio estas la maltigado.

En la bierfarejo, la malto estas ŝrotita (4), kirlita kun akvo, tiu supo iĝas kaĉo kiu estas infuzita, varmigita (5) kaj filtrita (6). Tiam, lupolo estas aldonita por aromigi kaj samtempe amarigi la sukeran moston kiu estas tiam boligita (7). Post filtrado, malvarmigado kaj aldono de gistoj, komenciĝas la fermento (8). Post maturiĝo (9) la biero estas filtrita (10), eltirita (11) kaj enboteligita (12). Jen, la tuta biera procedfarado.

La maltigado (1-3) daŭras inter 7 kaj 10 tagoj, poste la knedado (4-7) daŭras ĉirkaŭ 9 horojn. La fermentado (8) daŭras inter 4 kaj 10 tagoj, la maturado (9) inter 3 kaj 6 semajnoj kaj se oni duoble fermentas botelo aŭ barele la finfarado postulas kelkajn pliajn semajnojn. Finfine, ĝis la enboteligado, necesas nur unu horo.

Antaŭ ol komenci, notu ke mi kompilis etan vortliston rilate al tiu teknika priskribo. Por komencanto kiel mi, la teknika kaj scienca vortprovizo de tiu fako estas ofte ne klara, ambigua aŭ malfacile tradukebla, eĉ ne ekzistanta. Bedaŭrinde mi ne estas fakulo pri biero, do kvankam mi zorgis pri detaloj, certe restas ankoraŭ kelkaj

Ilustraĵo 1: La fazoj de la bierfarado.




eraroj pri scienco aŭ tekniko. Bonvolu fari al mi skribajn rimarkojn por ke mi korektu la fakvortojn kaj la priskribojn.

Nun pli detale ni revidu la diversajn etapojn.

Unue la ingrediencoj:

•**Hordeo** (*Hordeum vulgare*) estas unujara planto, pajla greno kiu altas 1 ĝis 1,7 m, kaj kiu havas karakteristikaĵojn longajn oreletojn kaj densajn spikojn de 4-12 cm, kiuj kliniĝas je matureco. Ĝi estas la plej malnova kultivata greno. Nun oni kultivas hordeon de tropikaj regionoj ĝis altitudo 4500m kiel en Tibeto, ĉar ĝi estas tre malde-likata greno.



Hordeo estis kultivita de antaŭ pli ol 8 000 jaroj en Mezopotamio kaj laŭ la Nilo. La plej malnovaj pruvoj pri hordeo datiĝas de 10 500 a.K. Kutima hordeo estas uzata pro siaj grajnoj (por maltigado), pro siaj kulmoj aŭ pro siaj folioj (kiel greso). Vintra hordeo estas uzata ĉefe kiel bestonutraĵo, ĝin karakterizas pli altaj rikoltkvantoj kaj relative multe da proteinoj (12-15 %).

La ekonomia signifo de hordeo estas malpli granda ol tiu de tritiko, maizo aŭ rizo. Tutmonde la produktado de hordeo (malta kaj gresa) estas de ĉirkaŭ 140 Mt (milionoj da tunoj). Nur 26 Mt oni produktas por la maltigado. Rilate al malta hordeo, Eŭropo estas la plej grava produktanto.

•**Lupolo** (*Humulus lupulus*) estas plurjara volviĝanta herba liano el la kanabacoj. Ĝi kreskas ĝis 6-10 m dank' al kvarangulaj tigejoj. Ĉar ĝi havas grandan lumbezono, oni kultivas ĝin vertikale sur stangpalisegoj. Lupolo havas 3- aŭ 5-lobajn foliojn kun femalaj floroj en konusosimilaj infloreskoj nomi-



taj strobiloj. Strobilojn oni uzas por bierfarado. Lupolo aldonas amarecon al biero pere de du gravaj komponentfamilioj: la humulono kaj la lupulono. Ĝi gravas ankaŭ kiel ŝaumstabilo kaj kiel konservilo.

Romanoj kredis ke lupolo suĉadas la sukcon de la arbo sur kiu ĝi grimpas, tiel ili nomis la planton "iom lupu", t.e. Lupolo. Ekstrakto de lupola strobilo entenas sedativajojn, oestrogenojn kaj favoras la produktadon de lakto kun ia malafrodiziiga efekteto.

•**Gisto** rilatas kun la magiako de bierfarado. La Germana leĝo ne mencias giston kiel ingrediencon ĉar gisto ne estis tute konata en 1516.

Gisto estas unuĉela fungo kiu respondecas pri la alkohola fermentado el sukeraj solvaĵoj (i.a. mosto) kaj pri ŝveligado de pasto.

La ĉefa biera gisto estis *Saccharomyces cerevisiae*, esperante konata kiel fornogisto, gistofungo aŭ biergisto. Ĝi estas ankaŭ uzata por fari panon.

Rilate bieron, ekzistas ĉefe tri tipoj de gistoj:

Saccharomyces cerevisiae. Ĝi responseblas pri la varma fermentado kiu okazas je ĉ. 20°C. Fine de fermentado, la gistoj altiĝas en la fermentujo.

Tiel oni bierfaras "**Elo**", "**Stout**", "**Weissen**".

Saccharomyces uvarum (antaŭe *Sacchromyces carlsbergensis*).

Responseblas pri malvarma fermentado kiu okazas je ĉ. 5°C. Fine de fermentado: la gistoj malaltiĝas en la fermentujo. Tiel on bierfaras "**Lagero**", "**Pilso**", ... Nuntempe tio estas la plej uzata biergiston.

Brettanomyces bruxellensis, *Brettanomyces lambicus*, kaj sovaĝaj gistoj.

Responseblas pri spontanea fermentado. Tiel oni bierfaras "**Lambiko**", "**Geŭzo**", "**Faro**".

Sekvo sur venonta Turanĝia Luko.

Denis Jeanteur

« Mi opiniis, ke vi havas strangan ĉinan akcenton ».

Estas la rimarko de vendisto en granda magazeno de Lillo, al kiu mi ĵus klarigis, ke mi interparolis en la esperanta kun lia ĉina klientino.



Okaze de la 100a Universala Kongreso, mia edzino kaj mi mem estis tre feliĉaj revidi ĉinan esperantistan amikino.

Dum pieda vizito de la urbo, ŝi petis, ke ni akompanu ŝin en horloĝvendejon ĉar ŝi ricevis peton de amikino, kiu deziris aĉeti brakhorloĝon.

Ni eniris en « Galeries Lafayette », kie ni petis vendiston de brakhorloĝoj. Kompreneble necesis traduki la demandojn kaj respondojn de la vendisto kaj de nia amikino. Ŝi deziris tre precizan modelon, kies foton ŝi ricevis sur la ekranon de ŝia poŝtelefono. Necesis ankaŭ transformi eŭrojn en juanojn.

La vendisto esti informata pri la esperanta kongreso ĉar videblis afiŝoj en la urbo. Per tiu konkreta ekzemplo de dialogo, mi esperas, ke li bone komprenis, kiom Esperanto estas vere universala lingvo.



29660 yuan (juano) = 4375 €

Prezo en Francio, laŭ la katalogo de la firmao Cartier [kartie], la 13an de Novembro : 5400 €

Jacques Gaumé

KAFA TIRAMISU

Preparado : 15 minutojn.

Ingrediencoj por 6 personoj :

- 1 saketo da biskvitoj
- 2 grandaj tasoj da forta kafo
- 250 gr da "mascarpone", itala fromaĝo
- 3 ovoj
- 80 gr da pulvorsukero
- 3 supkuleroj da amara kakaopulvoro

Batu la ovoblankojn ĝis firmiĝo, kun unu pinĉopreno da salo.

En alia plado, miksu la ovoflavojn, la sukeron kaj la italan fromaĝon ; poste, enmetu la ovoblankojn en la preparadon kaj delikate miksu (helpe de spatelo) ĝis obteno da homogena kremo.

Tremu la biskvitojn en la kafon kaj metu ilin sur la pladfundon.

Kovru ilin per la kremo kaj rekomencu ĝis la fino de ingrediencoj.

Surŝutetu kakaopulvoron pere de kribrileto sur la pladon kaj metu ĝin 6 horojn en la fri-dujon.

Pri "tiramisu"

Tia kuko enhavanta biskvitojn, "mascarpone" (itala fromaĝo) kaj kafon, iĝis tutmonde ŝatata klasikaĵo.

Malnovtempe, virinoj de Venecio preparis tiun deserton la antaŭtagon de la lesivtago. Post sia peniga laboro, ili povis gustumi tiun dolĉaĵon konsistantan el tavoloj de biskvitoj trempitaj en kafon kaj alkoholaĵon, alternaj kun "mascarpone" kremo.

Ĉar tiu plado helpis ilin por revigligi, ili nomis ĝin "tiramisŭ", kiu signifas: "revigligu min".

Jeannine kaj Gérard Layseman

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine

Halles de Tours

Place G. Paillhou

37000 TOURS

Tel : 02 47 44 62 12

esperanto-touraine37@wanadoo.fr

<http://esperanto-tours.1s.fr>